

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
tipografia edizioni **SAVIOLO** s.n.c. - Vercelli

Anno 90 - n. 6
NOVEMBRE-DICEMBRE 2011

KRISTNASKO 2011

Dal messaggio **URBI ET ORBI** del Santo Padre Benedetto XVI per il Natale 2010

"Il Verbo si fece carne". Di fronte a questa rivelazione, riemerge ancora una volta in noi la domanda: come è possibile? Il Verbo e la carne sono realtà tra loro opposte; come può la Parola eterna e onnipotente diventare un uomo fragile e mortale? Non c'è che una risposta: l'Amore. Chi ama vuole condividere con l'amato, vuole essere unito a lui, e la Sacra Scrittura ci presenta proprio la grande storia dell'amore di Dio per il suo popolo, culminata in Gesù Cristo.

(...)

Dio non muta, Egli è Amore da sempre e per sempre. È in Se stesso Comunione, Unità nella Trinità, ed ogni sua opera e parola mira alla comunione.

El la mesaĝo **URBI ET ORBI** de la Sankta Patro Benedikto la 16a por la Kristnasko 2010

"La Vorto fariĝis karno". Fronte al ĉi tiu revelacio, unu plian fojon elstaras en ni la demando: kiel tio estas ebla? La Vorto kaj la karno estas realaĵoj inter si kontraŭaj; kiel povas la Vorto eterna kaj ĉiopova fariĝi homo fragila kaj mortema? Estas nur unu respondo: la Amo. Kiu amas volas dividi kun la amato, volas esti kuniĝinta kun li, kaj la Sankta Skribo prezentas ĝuste la grandan historion de la amo de Dio al sia popolo, kulmininta en Jesuo Kristo. (...)

Dio ne ŝanĝiĝas, Li estas Amo de ĉiam kaj por ĉiam. Li estas en Si mem Komuneco, Unueco en la Triunuo, kaj ĉiu Lia faro kaj vorto celas la komunecon.

(el: www.ikue.org
tradukis: Antonio De Salvo)



LA SINJORO VENIS NIN SAVI:
Ni ĉoiu!

(pe. Luigi Alfano)

“El Camino de Santiago de Compostela” (“La irejo de Santiago de Kompostela”)

800-kilometra marŝado inter pejzaĝoj
 neimageble trapenetritaj de eksterordinara silento



amo aŭ simple, ĉar ĝi estas malmultekosta vojaĝo.

Eĉ hodiaŭ oni povas aŭdi personojn parolantajn malsamajn lingvojn, tamen la tutmondiĝo permesas al ni kompreni facile unu la alian.

La irvojo estas tre bone indikata per du simboloj: la *concia* (konko) kaj la flava sago.



Antaŭ kelkaj jaroj mi legis artikolon pri *El Camino* kaj tujtute mi sentis, ke ĝi estas la ĝusta afero por mi! *El Camino* estas longa vojo, kiun la pilgrimantoj laŭiras startante de diversaj lokoj en Eŭropo por atingi Galicion en nord-Hispanio, kie la relikvoj de Sankta Jakobo estis malkovritaj en la 9a jarcento.

La devoteco al Sankta Jakobo la Maĵora (S-ta *James*, *Jacques*, *Giacomo*, *Diego*, *Jago* kaj finfine *Santiago*) estis grandega. Iam, por atingi Santiagon, la pilgrimantoj estis pretaj piediri multajn centojn da kilometroj kaj alfronti ĉian danĝeron, kiel: malsanojn, sovaĝajn bestojn, danĝerajn lokojn, malbonegan veteron. La marŝado povis daŭri monatojn, pro tio multaj

pilgrimantoj faris testamenton antaŭ ol forlasi siajn domojn.

Ili alvenis de tre malproksimaj lokoj el la tuta Eŭropo, ili parolis malsamajn lingvojn aŭ dialektojn, havis malsamajn vestojn, sed ili havis unu komunan aferon: la Kristanan kredon. Ĉi tio devus komprenigi al oni, kial nuntempe oni parolas pri *Eŭropaj Kristanaj radikoj*.

Kiel en la pasinteco ankaŭ hodiaŭ estas multaj personoj, kiuj laŭiras *El Camino*-n. Ili alvenas de la tuta Eŭropo kaj ankaŭ el multaj aliaj landoj de la mondo. Iuj estas pilgrimantoj, kiuj faras ĉi tiun pilgrimon pro kredo aŭ pro spirita serĉo, aliaj faras ĝin pro diversaj kialoj: pro sporto-marŝado, pro natur-

Ĉiuj pilgrimantoj kutimas alkroĉi konkon al siaj dorso-sakoj tiel, kiel la pilgrimantoj kutimis fari en la pasintaj jarcentoj. En la pasinteco, kiam pilgrimantoj alvenis al Santiago de Kompostela, ili daŭrigis la vojaĝon ĝis *Finisterre* apud la Atlantika oceano kaj forportis konkon de la plaĝo, kiel pruvon, ke ili komplet-

igis la pilgrimadon.

Mi planis startigi mian pilgrimadon en Majo/Junio 2006, kaj kelkajn monatojn antaŭe, mi komencis trejniĝi. Ĉiutage mi piediris plurajn kilometrojn kaj mi faris kelkajn grimpadojn kun mia dorsosako, tiom peza, kiom ĝi estos dum la *El Camino*.

Finfine mi veturis trajne de Milano al *St. Jean Pied de Port*, Francio, ĉe la piedoj de Pireneoj, kie mi komencis supreniri. Mi elektis la irejon "*Camino Francés*".

Dum 33 tagoj mi ĝuis la belecon kaj la ĉarmon de *El Camino Francés* kun ĝiaj tre belaj pejzaĝoj, meditajn kaj preĝajn momentojn, artajn verkojn kaj interesajn paroladojn kun aliaj pilgrimantoj. Ĉiam mi tenis en mia koro ĉiujn miajn familianojn kaj amikojn, pro tio ili estis kunirantaj kun mi!

Kelkaj personoj piediras aŭ biciklas nur parton de *El Camino* intencante fini ĝin estontece, sed mi pensas, ke ĝi estus farena tutope, piede kaj solece.

Mi ĝojis pro ĉiuj etapoj de *El Camino* kvankam kelkaj el ili frapis min pli multe ol aliaj, ekzemple kiam mi restis ĉe *San Nicolas*, malgranda 11-jarcenta gastejo, kie la gastigantoj bonvenigas la pilgrimantojn kisanter kaj lavante iliajn piedojn kiel simbolo de kristana bonveno. Tie bona vespermanĝo estas donata al ĉiuj tranoktintoj,

kaj la sekvantan matenon oni benas la pilgrimantojn, kiuj foriras.



Alia speciala loko estis Granon, kie la pilgrimantoj estas gastigitaj en la paroĥa domo ĉe romanika preĝejo. La paroĥestro ne petas monon por la tranoktado, nek por la vespermanĝo kaj matenmanĝo, sed simple oni povas meti monoferon en skatolon, sur kiu estas la skribo:

"Deja lo que puedas, toma lo que necesites"



("Enmetu kion vi povas, prenu kion vi bezonas").

Eĉ se iu pensas, ke estas li, kiu "faras" *El Camino*-n, tamen estas *El Camino*, kiu "faras" lin, tagon post tago. Ĝi iom post iom forĝas vin per la taga penado, per mal-

facilaĵoj, per endaj decidoj kaj per suferaj kaj feliĉaj momentoj. *El Camino* estas metaforo de la vivo.

Kion pri la pilgrimanto?

La pilgrimanto estas persono, kiu havas celon: alveni al Santiago kaj transiri la mirindan Portalon de la Gloro. La Portalo estis farita de Majstro Mateo en 1188, sesdek jarojn post la konstruado de la katedralo. Ĝi estas turnita al sunsubiro kaj estas la simbolo de la tempofino, de la fina juĝo kaj de la Apokalipso.

La pilgrimanto estas persono, kiu havas deziron. En iu momento de sia vivo, li decidas foriri kaj vere li foriras.

La pilgrimanto piediras kaj pensas, marŝas kaj meditas, iras kaj renkontas aliajn personojn.

La pilgrimanto piediras, esperas kaj preĝas.

La pilgrimanto piediras, ridas kaj ploras, kantas kaj silentas, restas kun si mem kaj kun la aliaj.

La pilgrimanto fidus je la aliaj, akceptas ĉion kaj estas fidema. Li fidus al ĉio, kio okazas dum *El Camino*, ĉar ĉi tio estos utila por li mem aŭ por aliaj, ankaŭ se tujtuje oni ne komprenas.

La pilgrimanto piediras kaj, se tio eblas, li ne planas la etapojn. Matene li ne scias, kie li dormos nokte, ĉar li ne konas tion, kion *El Camino* pretigis al li.

La pilgrimanto estas tute libera.

La pilgrimanto piediras kaj riskas. Li riskas, ĉar li engaĝiĝis en malfacilega entrepreno, kiu dependas-kaj-ne dependas de li. Li riskas atingi Santiagon netrovinte la “perlon”, kiun li serĉis kaj pri kiu li revis.

La pilgrimanto piediras kaj memoras. Li revuas sian tutan vivon kun la vivantoj kaj la mortintoj.

Li sentas bezonon pardonon kaj esti pardonata. La pilgrimanto konfesas siajn pekojn

dumvoje aŭ en Santiago.

La pilgrimanto piediras kaj – se Dio permesas – li atingas Santiagon. La pilgrimanto dankas Dion.

La pilgrimanto – se Dio permesas – revenas hejmen, ĉar la vivo daŭras. Li scias ke la Portalo de la Gloro, kiu bonvenigis lin en Santiago estas nur simbolo de la Alia Portalo, kiu atendas lin je la fino de ĉi tiu vivo:

finis terrae, initium coeli.

La pilgrimanto estas persono de paco, pro tio dum

estas vivo li batalas por bona batalo.

Nun mi estas hejmen reveninta, dankema pro ĉi tiu mirinda sperto kaj feliĉa ĉar mi atingis Santiagon kaj trairis la Portalon de la Gloro. Mi estas tre dankema ankaŭ ĉar dum *El Camino* mi neniam havis piedan aŭ kruuran problemon. Mi havas multajn belajn memorojn.

El Camino estas speco de firstolinio, kiu apartigas la “antaŭon” disde la “posto”.

Ida Bossi



Por informoj skribu al aŭtorino: ida.bossi@fastwebnet.it

NOVEMBRO

Lante folioj disiĝas el branĉoj.
De aŭtuna birdeto ni aŭdas voĉeton
laŭlonge de vojo kampara.
Konsolas sonorilo la valon
de niaj ploradoj.
Dolĉeco, tristeco florigas
tombejon.
En nokta silento ni aŭdas,
mallaŭte, profunde, la preĝon
de niaj vivantaj mortintoj.

Karlo Odisio (Gabiano)



(bildo el: www.qumran2.net)



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

Prega e cammina

L'umanità tutta è in viaggio. La creazione stessa accende stelle nel cielo per condurre il cammino verso oriente, da dove viene la salvezza. Quando l'uomo si sente perduto, allora si mette sulla strada, si fa viandante, lasciandosi guidare dall'istinto, sensazione interiore, fino a sentire che tutto il creato sostiene il suo cammino.

Agli inizi della Chiesa, quando ancora non c'era niente all'infuori dell'esperienza con Gesù, che alla fine appariva come il risorto, i primi cristiani si ritrovavano spesso per la preghiera comune. Oltre ad essere *«assidui nell'insegnamento degli apostoli, nell'unione fraterna e nella frazione del pane»* essi perseveravano *«nelle preghiere»* (Atti 2, 42).

L'atteggiamento dell'orante si addice molto a quelli che guardano lontano, cioè a quelli che credono al cambiamento. Questi si radunano spesso per dare spazio al respiro della preghiera, indispensabile per riprendere le forze e per incamerare ossigeno, necessario per cambiare questo mondo nel modo giusto.

Per non essere presi solo da se stessi e dai problemi della sopravvivenza, è necessario il respiro della preghiera. Se non vogliamo annoiarci nella perfezione dei nostri divertimenti, distogliendoci dal vero senso dell'esistenza umana, abbiamo bisogno del dono della preghiera. Per fecondare la nostra esperienza di vita e renderla

Preĝu kaj rapidu

La tuta homaro estas vojaĝanta. La kreado mem estigas stelojn en la ĉielo por indiki la vojon al oriento, de kie venas la savo. Kiam la homo sentas sin perdita, tiam li sin metas survoje, li fariĝas vojiranto, lasante sin konduki de la instinkto, interna sensacio, ĝis kiam li sentas, ke la tuta kreado subtenas lian vojiradon.

Ĉe la komenco de la Eklezio, kiam ankoraŭ estis nenio krom la sperto kun Jesuo, kiu je la fino aperis kiel la resurektinto, la unuaj kristanoj ofte kunvenis por la komuna preĝo. Krom tio, ke ili estis *«konstantaj en la instruo de la apostoloj, en la kunuleco kaj en la dispecigo de la pano»* ili eĉ persistis *«en preĝoj»* (Agoj, 2, 42).

La sinteno de la preĝanto multe taŭgas al tiuj, kiuj rigardas malproksime, tio estas al tiuj, kiuj kredas je la ŝanĝiĝo. Ĉi tiuj ofte ariĝas por doni lokon al la spirado de la preĝo, absolute necesa por reakiri la fortojn kaj por alproprigi al si oksigenon, nepran por ŝanĝi ĉi tiun mondon laŭ la ĝusta maniero.

Por ne esti plenkaptitaj nur de si mem kaj de la problemoj por la vivteno, necesas la spirado de la preĝo. Se ni ne volas enui en la perfekteco de niaj amuziĝoj, fortunante nin de la vera signifo de la homa ekzisto, ni bezonas la donacon de la preĝo. Por plifortigi nian sperton de vivo kaj igi ĝin interesa por niaj okuloj kaj tiuj

interessante ai propri occhi e alla società, è indispensabile che il grido della preghiera plasmi la giornata e risuoni ogni giorno. Se l'impegno di «spezzare il pane» richiede di tenere sempre la porta aperta verso Dio, affinché Dio la tenga aperta verso di noi, allora lo spazio della preghiera deve interessare tutta la giornata attraverso il grido del cuore, dell'anima e della volontà.

Il grido, che sta alla base di ogni vera preghiera, sgorga dal cuore di chi non chiede più che il cielo scenda sulla terra, in quanto non desidera più portare il sole nel fienile; si sviluppa nell'anima di chi coltiva il desiderio di mettere tutta la terra sotto la luce e il calore del cielo; è tenuto vivo nella mente di chi chiede con insistenza che la signoria di Dio sia accolta sulla terra come la pensiamo nel cielo.

Deporre la nostra volontà nella volontà di Dio significa depositarla là dove sta la buona volontà, significa fondersi con la buona volontà di tutti gli altri, significa ancora non disperderla. Questo richiede sforzo mentale, desiderio infinito, grido dell'anima. È vivere già ora su un'altra dimensione, dove Dio diventa ogni giorno il Dio vicino, che in Cristo ci fa un solo corpo.

Ecco un viaggio verso il centro del cuore, aperto sull'immensità dell'esistenza, capace di interessare ogni aspetto della vita di una persona e della comunità: un viaggio senza noia e senza cadute di tensione. Nel movimento esperantista riscopriamo il desiderio di cambiare il mondo nel modo giusto, ma spesso manca quel grido profondo capace di mettere in cammino chiunque in qualunque situazione si trovi. Tuttavia, proponendo e usando una lingua comune, gli esperantisti si presentano come persone in viaggio, aperte verso il cielo e verso gli altri. Almeno fino a quando nel cuore vive il grido della preghiera.

dela socio, nepras, ke la krio de la preĝo modeligu la tagon kaj resonu ĉiutage. Se la sindevigo «dispecigi la panon» postulas, ke ni tenu ĉiam malfermita la pordon al Dio, por ke Dio tenu ĝin ĉiam malfermita al ni, tiam la loko de la preĝo devos koncerni la tutan tagon pere de la krioj de la koro, de la animo kaj de la volo.

La krio, kiu estas la ĉefa subtenilo de ĉia vera preĝo, fontas el la koro de tiu, kiu ne plu petas, ke la ĉielo malsupreniru sur la tero, ĉar li ne plu deziras porti la sunon en la fojnejon; ĝi evoluas en la animo de tiu, kiu flegas la deziron meti la tutan teron sub la lumon kaj la varmon de la ĉielo; ĝi estas vigle konservata en la penso de tiu, kiu insiste petas, ke la Dia regado estu akceptata sur la tero tiel, kiel ni kredas, ke ĝi estas en la ĉielo.

Allasi nian volon en la Dian volon signifas demeti ĝin tien, kie estas la bona volo, signifas kuniĝi kun la bona volo de ĉiuj aliaj, signifas krome ne disperdi ĝin. Ĉi tio postulas intelektan streĉon, senfinan deziron, krion de la animo. Tio ĉi estas vivi jam nun laŭ alia dimensio, kie Dio iĝas ĉiutage la apuda Dio, kiu en Kristo unuigas nin en ununura korpo.

Jen vojaĝo al la centro de la koro, malfermita super la senlimo de la ekzistado, kapabla koncerni ĉiun aspekton de la vivo kaj de persono kaj de komunumo: vojaĝo sen enuo kaj sen streĉiĝo. En la esperanta movado ni konstatas la deziron ŝanĝi la mondon laŭ la ĝusta maniero, sed ofte mankas tiu profunda krio, kapabla survoĝigi iun ajn, en ajna situacio kie li troviĝas. Tamen, proponante kaj utiligante komunan lingvon, la esperantistoj sin prezentas kiel vojaĝantojn, malfermitaj al la ĉielo kaj al la aliaj. Almenaŭ dum viglas en la koro la krio de la preĝo.

Dirite inter ni ...



011

KUN AVĈJO KAJ AVNJO

- Jen, ni estas ĉi tie.
- Ha, vi revenis.
- Jes, ni revenis rapide.
- Kial?
- Ĉar ni malsatas.
- Ĉu vi aĉetis viajn ĵurnalojn?
- Kompreneble, ke mi ilin aĉetis.
- Ĉu vi aĉetis ankaŭ revuon por mi?
- Por vi mi prenis du revuojn.
- Ĉu du?
- Jes, du.
- Kial?
- Ĉar mi ne memoris, kian vi deziras, ĉu unu aŭ la alian.
- Mi volis tiun, kiu alvenis hodiaŭ.
- Sed hodiaŭ la ĵurnalvendisto ricevis du porvirinajn revuojn, unu semajnan kaj unu monatan.
- Jen la kialo.
- Vi ne pensis pri la monata revuo.
- Jes, pri tiu mi ne pensis.
- He, vi fariĝas maljuna. Vi perdas vian memorkapablon.
- Kaj vi...
- Karaj miaj geavoj, ĉu ni pensu pri pli seriozaj aferoj? Mi malsatas. Kaj krome, mi devos ankaŭ studi.
- Ha, jes, vi pravas. Ĉu vi vidas, ke ni perdas la koncentriĝon?
- Ni ne devas forgesi pri vi, nia kara nepo.
- Ĉu vi volas lavi viajn manojn antaŭ altabliĝi?
- Jes, volontе, ankaŭ pro tio, ke Hundo montris al mi sian bonvolemon lekante ilin.
- Brava besto, nia Hundo.
- Kaj atenta.
- Aŭskultu kiel li bojas en la ĝardeno.

CON NONNO E NONNA

- Ecco, siamo qui.
- Ah, siete tornati.
- Sì, siamo ritornati in fretta.
- Perché?
- Perché abbiamo fame.
- Hai comperato i tuoi giornali?
- Naturalmente, che li ho comperati.
- Hai comperato anche una rivista per me?
- Per te ho preso due riviste.
- Due?
- Sì, due.
- Perché?
- Perché non ricordavo che cosa volevi, se l'una o l'altra.
- Volevo quella che è arrivata oggi.
- Ma oggi il giornalista ha ricevuto due riviste femminili, una settimanale ed una mensile.
- Ecco il perché.
- Non hai pensato alla rivista mensile.
- Sì, a quella non ho pensato.
- Eh, diventi vecchia. Perdi la tua capacità di memoria.
- E tu...
- Miei cari nonni, pensiamo a cose più serie? Ho fame. E poi, dovrò anche studiare.
- Ah, sì, hai ragione. Vedi che perdiamo la concentrazione?
- Non dobbiamo dimenticarci di te, caro il nostro nipote.
- Vuoi lavarti le mani prima di metterti a tavola?
- Sì, volentieri, anche perché Hundo mi ha mostrato il bene che mi vuole leccandole.
- Brava bestia, il nostro Hundo.
- Ed attento.
- Ascolta come abbaia in giardino.

- Neniu rajtas apudiĝi sen lia permeso.
- Jes, li estas bona gardo-hundo.
- Kaj vi povas resti trankvilaj ankaŭ dum la nokto.
- Nu, iru, lavu viajn manojn kaj ni komencos manĝi.

- Bone. Ni finis mangi kaj, kiel antaŭdirite, ni manĝis tre bone.
- Jes, ja, oni devas diri, ke via avino estas lerta kuiristino.
- Tre lerta.
- Mi lernis de mia patrino.
- Kaj mia patrino lernis de vi.
- Estas preskaŭ familia tradicio.
- Nur vi, tamen, havas tempon por ĝin dediĉi al la kuirejo.
- Kion fari? La kaseroloj allogas min.
- Kaj mi amas vin kaj viajn kaserolojn.
- Via avo ŝercas, sed li estas vera bongustemulo. Mi ĝojas, kiam mi konstatas, ke mi sukcesis kontentigi lin.
- Kaj mi ĝojas. ĉar mi manĝas bone, mi ĝuas la atenton de mia edzino, kiu ĉiam zorgas pri mi.
- Kaj viaflanke vi zorgas pri mi, ĉar vi ĉiam atentigas je miaj necesoj.
- Mi vidas, ke vi estas kontentaj unu pri la alia.
- Ho, jes, ni vivas ĝenerale en bona harmonio.
- Ankaŭ se kelkfoje mi estas iom grumblema.
- Sed oni pardonas ĉion al grumblemulino, kiu estas kuirarte tiom lerta.
- Kaj ankaŭ al tia grumblemulo, kia vi estas, oni ĉion pardonas.
- Vi estas vere bela paro.
- Nu, ni ne plu klaĉadu. Vi devas komenci studi, alimaniere vi havos problemojn kun la pridemandadoj.
- Mia avinjo estas tre saĝa; mi prenos miajn librojn kaj mi iros en la ĝardenon.
- Bonan studadon.
- Bonan studadon.
- Dankon al ambaŭ.

- Nessuno si può avvicinare senza il suo permesso.
- Sì, è un buon cane da guardia.
- E potete stare tranquilli anche durante la notte.
- Su, vai, lavati le mani e cominceremo a mangiare.

- Bene. Abbiamo finito di mangiare e, come detto prima, abbiamo mangiato molto bene.
- Sì, certo, si deve dire che tua nonna è un'abile cuoca.
- Molto brava.
- Ho imparato da mia madre.
- E mia madre ha imparato da te.
- È quasi una tradizione di famiglia.
- Tuttavia solamente tu hai tempo da dedicare alla cucina.
- Che fare? Le pentole mi attirano.
- Ed io amo te e le tue pentole.
- Tuo nonno scherza, ma è un vero buongustaio. Sono piena di gioia quando vedo che sono riuscita ad accontentarlo.
- Sono contento perché mangio bene, godo dell'attenzione di mia moglie, che sempre ha cura di me.
- E da parte tua, tu ti curi di me perché sei sempre attento alle mie necessità.
- Vedo che siete contenti l'uno dell'altra.
- Oh, sì, in generale noi viviamo in buona armonia.
- Anche se qualche volta sono un po' brontolona.
- Ma si perdona tutto ad una brontolona che è tanto capace nell'arte della cucina.
- E si perdona tutto anche ad un brontolone come te.
- Siete veramente una bella coppia.
- Su, non chiacchieriamo più. Devi cominciare a studiare, altrimenti avrai dei problemi con le interrogazioni.
- La mia nonnina è molto saggia: prenderò i miei libri ed andrò in giardino.
- Buon studio.
- Buon studio.
- Grazie ad entrambi.

STUDANTE EN LA GARDENO

- Jen, nun mi povos studi iomete, ĉar mi vere devas bone prepari mian lecionon.
- Ĉi tie neniŭ ĝenas min.
- Ĉi tie estas tro sune.
- Tie estas bela enombro loko.
Hm, la benko ne estas taŭga.
- Pli bone tie, kie estas ĉu sego ĉu tablo.
- Cetere, tiu estas la loko, kiun mi elektis ankaŭ la pasintan fojon.
- Bone.
- Ha, jes, la librojn mi lasis tie.
- Jen ili.
- Ili estas du belaj volumegoj.
- Bonŝance, ke mi ne devas ilin tute trastudi.
- Por tion fari, mi bezonus almenaŭ unu semajnon.
- Nu, mia tasko estas studi unu ĉapitron el unu volumo kaj alian el la alia.
- Estas simple, sed por tion fari mi devos ŝvitegi.
- Ŝvitegi? Kial? Mi elektis belan, enombran lokon!
- Nu, nu, mi ne plu ŝercu. Mi komencu mian laboron.
- Jen, je pago 34-a de la unua volumo.
- Precize ĉi tie.
- Mi esperas, ke neniŭ ĝenos min.
- Kaj vi, mia hundeto, restu tie, kiel vi faris ĝis nun. Svingu vian voston, ne bojadu, kaj pensu, se tio helpas, pri ĉarma hund-ineto.
- Bonan studadon.


- Avinjo, avinjo!
- Kio okazas, Karlo?
- Ĉu vi vidis la testudon, kiu estas en la ĝardeno?
- Testudo?

STUDIANDO IN GIARDINO


- Ecco, ora potrò studiare un pochino perché devo veramente preparare bene la mia lezione.
- Qui nessuno mi disturba.
- Qui è troppo assolato.
- Là c'è un bel posto all'ombra.
- Hm, la panca non è adatta.
- Meglio là; dove c'è sia una seggiola sia un tavolo.
- D'altro canto, quello è il luogo che ho scelto anche la volta scorsa.
- Bene.
- Ah, sì, i libri li ho lasciati là.
- Eccoli.
- Sono due bei volumoni.
- Per fortuna non devo studiarli interamente.
- Per far ciò avrei bisogno di almeno una settimana.
- Ebbene, il mio compito è studiare un capitolo da un volume e l'altro dall'altro.
- È semplice, ma per far ciò dovrò sudare molto.
- Sudare molto? Perché? Ho scelto un bel posto all'ombra.
- Su, su, bando agli scherzi. È ora che cominci il mio lavoro.
- Ecco, a pagina 34 del primo volume.
- Proprio qui.
- Spero che nessuno mi disturberà.
- E tu, cagnolino mio, rimani là, come hai fatto fino a questo momento. Muovi la tua coda, non abbaiare, e pensa, se ciò t'aiuta, ad una bella cagnolina.
- Buon studio.

- Nonna, nonna!
- Cosa succede, Carlo?
- Hai visto la tartaruga che è nel giardino?
- Una tartaruga?

- Jes, testudo.
 - Ne eblas.
 - Sed ĝi estas ĉi tie.
 - Lasu min vidi.
 - Jen, tie, sub tiu heĝo.
 - Jes, vi pravas, ĝi estas tie.
 - Kaj ĝi estas granda.
 - Vidu, kiel ĝi elmetas la kapon el la kiraso.
 - Temas vere pri bela ekzemplero.
 - Jes, sed ĝi ne estas nia.
 - Ĉu vi certas, ke avĉjo ne portis ĝin?
 - Ho, jes, mi bone konas lin: tion li ne faris centprocente.
 - Kial vi diras tion?
 - Ĉar ni interdiskutis antaŭ kelkaj tagoj pri la problemo de la impostoj por tiuj bestoj.
 - Ĉu li ne volas havi problemojn?
 - Kompreneble, li jam havas multajn aliajn zorgojn.
 - Kiajn zorgojn?
 - Li devas jam pagi la impostojn por la domo, por la sano, kaj mi povus kotopi.
- (da ktp. = kaj tiel plu)*
- Sed besto estas ankaŭ amuzo.
 - Por tio jam ekzistas nia hundo.
 - Vi pravas, la hundo estas tre bona kunulo por avĉjo.
 - Kiel vi scias, li ĉiam eliras kun la hundo, kaj tiu ĉiam sekvas lin.
 - Jes, tio estas vera. Ankaŭ al mi plaĉas via hundo.
 - Oni povas diri, ke ĝi estas diskreta akompananto de nia ĉiutaga vivo.
 - Oni sentas lian ĉeeston, sed tio estas neniel ĝena.
 - Nu, vi diris: ĝi estas hundo diskreta.
 - Sed ni revenu al nia testudo.
 - Ĉu ni voku avĉjon?
 - Jes, ni voku lin, kaj ni aŭdu kion li konsilas.
 - Avĉjo, avĉjo!
 - Sì, una tartaruga.
 - Non è possibile.
 - Ma è qui.
 - Fammi vedere.
 - Ecco, là, sotto quella siepe.
 - Sì, hai ragione, è là.
 - Ed è grande.
 - Guarda come sporge la testa dalla corazza.
 - Si tratta veramente di un bell'esemplare.
 - Sì, ma non è nostra.
 - Sei certa che non l'ha portata il nonno?
 - Oh, sì, lo conosco bene; non l'ha fatto al cento per cento.
 - Perché lo dici?
 - Perché abbiamo discusso tra di noi alcuni giorni fa sul problema delle tasse per quegli animali.
 - Non vuole avere problemi?
 - Naturalmente, ha già molte altre preoccupazioni.
 - Che preoccupazioni?
 - Deve già pagare le tasse per la casa, per la salute, e potrei continuare.
 - Ma un animale è anche un divertimento.
 - Per questo c'è già il nostro cane.
 - Hai ragione, il cane è un compagno molto valido per il nonno.
 - Come sai, esce sempre con il cane, e quello lo segue sempre.
 - Sì, questo è vero. Anche a me piace il vostro cane.
 - Si può dire, che è un discreto accompagnatore della nostra vita quotidiana.
 - Si sente la sua presenza, ma questo non è per niente fastidioso.
 - Ebbene, l'hai detto: è un cane discreto.
 - Ma torniamo alla nostra tartaruga.
 - Chiamiamo il nonno?
 - Sì, chiamiamolo e sentiamo che cosa consiglia.
 - Nonno, nonno!



Nia eta Parnaso



Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

MENDICANTE.

ALMOZULO

*Era li
ogni mattina,
mucchio di cenci
all'angolo dei portici.*

*Cadeva
dalla mia mano l'obolo
sul lembo del suo cencio.*

*Usciva allora
dal lurido cappuccio.
un naso,
due occhi acquitrinosi,
due stagni senza vita,
e, verso me
girava lentamente il viso:
era il suo grazie.*

*Scopriva allora
il volto raggrinzito
la guancia incisa
a colpi di piccozza.*

*Non gli anni,
la fame, la miseria
forse l'alcool
avevano scavato.*

*Era li,
inverno dopo l'altro,
all'angolo usuale,
ogni mattina,
freddo, neve, vento
era sempre li:
mucchio di cenci.*

*Ma un giorno
l'angolo fu vuoto.*



Da un El
dipinto di: pentraĵo de:
Carlo Ludovico Bompiani

*Li estis tie
ĉiumatene
amaso da ĉifonoj
ĉe la portik-angulo.*

*Elfalís
de mia mano la ofero
sur la ĉifonan radon.*

*Eliris tiam
el la sombra kapuĉo
iu nazo,
du marĉaj okuloj,
du senvivaj lagetoj
kaj, kontraŭ min
li lante turnis la vizaĝon:
tio estis lia dankemo.*

*Tiam li malkaŝis
la faltitan vizaĝon
la vangon gravurita
per pioĉet-batadoj.*

*Ne la jaroj,
la malsato, la mizero,
eble la alkoholo
estis forkavintaj.*

*Li estis tie,
vintron post la alia,
ĉe la kutima angulo,
ĉiumatene,
frostoj, neĝo, vento,
li estis ĉiam tie:
amaso de ĉifonoj.*

*Sed iun tagon
l'angulo estis senhoma.*

Helo en la tenebroj

Estos senvualigitaj la trezoroj de la Vatikana Sekreta Arĥivo.

“Ke la lumo disvastiĝu el la elmontro laŭ la sep antaŭ-establitaj monatoj de ĝia daŭro; la *Arkanoj* tial estu iluminitaj kaj la vizitanto vidu la verajn trezorojn de la *Vatikana Sekreta Arĥivo*, kiuj estas ĝiaj sennombraj paperoj kaj pergamenoj, ĝiaj kodeksoj, manuskriptoj, aktoj kaj dokumentoj”, diris Kardinalo T. Bertone inaŭgurante en Vatikano la elmontron *Lux en arcana* - lumo sur la sekretoj - kiu okazos de februaro ĝis septembro 2012.



La *Dictatus Papae* de Gregorio la 7a de 1075 reasertanta la unuarangecon de la Ĉefpontifiko, la *Buleo kiu deklaris detronigita Frederikon la 2an*, redaktita de Inocento la 3a, la *Peticio* al Klemento la 7a de 1530 por nuligi la geedziĝon de Henriko la 8a kaj Katarina de Aragona, la *teksto de la malkonfeso* de de piza scienculo Galilejo, subskribita kun trema mano la 22an de junio 1633 en konvento de la Minerva en Romo, *sursilka letero de Helena el Ĉinio* al la papo Inocento la 10a en 1650, post ŝia konvertiĝo al kristanismo, *surbetulsela letero de amerikaj indianoj Ojibwe* al Leono 13a en 1887... Tiuj ĉi kaj aliaj trezoroj estos montrataj al la publiko en la muzeoj de la Urbo por festi la kroman centjariĝon de la reordigo, en Romo, de la Arĥivo Sekreta Vatikana.

Inter la atestaĵoj de milo da jaroj de historio estos montrataj ankaŭ iuj dokumentoj ĝis nun rezervitaj, relativaj al la dua monda milito kaj al la papado de Pio la 12a.

(Armando Zecchin)

Chiarore nelle tenebre


Saranno svelati i tesori dell'Archivio Segreto del Vaticano

“Che la luce si diffonda dall'esposizione durante i sette mesi prestabiliti della sua durata; siano illuminati così gli *Arcani* ed il visitatore veda i veri tesori dell'Archivio Segreto del Vaticano, che sono le sue innumerevoli carte e pergamene, i suoi codici, manoscritti, atti e documenti”, ha detto il Cardinale T. Bertone inaugurando in Vaticano l'esposizione *Lux en arcana* – luce sui segreti – che avrà luogo da febbraio a settembre 2012.

Il *Dictatus Papae* di Gregorio VII del 1075, che riaffermava la supremazia del Sommo Pontefice, la *Bolla*, redatta da Innocenzo III, che dichiarava detronizzato Federico II, la *Petizione* a Clemente VII del 1530 per far annullare le nozze di Enrico VIII e Caterina d'Aragona, il testo dell'*abiura* dello scienziato pisano Galileo firmata con mano tremante il 22 giugno 1633 nel convento della Minerva a Roma, una lettera scritta sulla seta da Elena dalla Cina al Papa Innocenzo X, nel 1650, dopo la conversione di costei al Cristianesimo, una lettera scritta sulla scorza di betulla dagli indiani d'America *Ojibwe* a Leone XIII nel 1887... Questi ed altri tesori saranno mostrati al pubblico nei Musei della Città del Vaticano per festeggiare il secondo centenario del riordinamento, a Roma, dell'Archivio Segreto del Vaticano.

Tra gli attestati di migliaia di anni di storia saranno mostrati anche alcuni documenti, fino ad ora riservati, relativi alla seconda guerra mondiale ed al papato di Pio XII.

(traduzione di Silvia Garnero)



26° Congresso dell'UECI

Albisola (Savona) 25-29 Maggio 2012



Il 26° congresso dell'UECI si terrà l'anno prossimo a Albisola Superiore, provincia di Savona, presso il Centro di Spiritualità **"Santuario della Pace"**, da venerdì 25 al martedì 29 maggio 2012.

Il luogo, in una valle ai piedi di una collina, immerso nel verde a circa 3 chilometri dal mare è facilmente raggiungibile sia per ferrovia sia in automobile. Chi viaggia in treno sulla linea Genova-Ventimiglia o Torino-Savona, trova la stazione di Albisola da cui un autobus porta a destinazione in pochi minuti; tuttavia pochi treni fermano lì, quindi conviene proseguire fino a Savona. Dal piazzale della stazione, ogni mezzora parte l'autobus che ferma alla stazione di Albisola e prosegue fino a Santuario della Pace dove fa capolinea. Chi viaggia in auto può prendere l'autostrada A10 (Autostrada dei fiori - Genova Ventimiglia) ed uscire al ca-

sello di Albisola, il kongresejo si trova a circa due chilometri, direzione nord.

La zona è ricca di località interessanti; il Comitato Centrale le sta ancora valutando, perché, è il caso di dirlo, c'è l'imbarazzo della scelta.

Il Centro di Spiritualità che ci ospiterà è costruito intorno al "Santuario della Madonna Della Pace". Questo santuario fu costruito sul luogo dove il 18 ottobre 1492 ci fu un

intervento miracoloso della Vergine Maria che fece cessare una battaglia sorta per motivi di confine tra i comuni di Albisola e di Stella (tra parentesi a Stella nacque ed ora è sepolto Sandro Pertini).

Il fatto di trovarci in quel luogo ha suggerito i temi del nostro congresso: il tema religioso sarà:

**Vi lascio la pace,
vi do la mia pace**

mentre il tema culturale sarà:

Educare alla pace.

Quest'anno il congresso, prevede anche il rinnovo del Comitato Centrale UECI per il triennio 2012-2014.

Da parecchi anni le quote di partecipazione sono rimaste invariate, quest'anno per pareggiare i conti ci sarà un incremento della quota totale di 20 euro, ma speriamo che questo non distolga nessuno dal partecipare. Nel prossimo numero di Katolika Sento troverete l'aligilo.



Bibliaj Tagoj (kun Adoru)

Trento 7-11 Marto 2012



Sanktejo *Madonna della Lasta*

Jam de kelkaj jaroj, iniciate de germanaj kristanaj esperantistoj (katolikaj kaj protestantoj) oni okazigis en Germanio pribibliaj renkontiĝoj, la "Bibliaj Tagoj", dum kiuj oni renkontiĝis por prikonsideri erojn de la Sanktaj Skriboj kaj vivi komunajn spertojn kiel preĝi kaj kanti el "Adoru", sidi ĉe la sama manĝotablo kaj kune viziti la regionajn preĝlokojn. En ĉi tiuj kvartagaj renkontiĝoj, partoprenis ankaŭ alilandaj esperantistoj, tial ke la renkontiĝo iĝas kvazaŭ malgranda ekumena kongreso. En la ĉijara kunveno (vd. K.S. n. 3/2011) partoprenis ankaŭ kvar samideanoj de Trento, kiuj proponis sian urbon por la "Bibliaj Tagoj" de la venonta jaro. La ideo esti akceptita entuziasme, kaj Stefan Lepping, organizanto de tiuj renkontiĝoj, proponis skemon de programo

kaj invitas nin partopreni.

La kunveno okazos ĉe la Sanktejo "*Madonna delle Laste*", en domo de karmela monaĥejo, kiu disponas pri komunaj salonoj, manĝejo kaj kapeleto. Tie oni povas ankaŭ loĝi, kaj tio estas konsilinda, kvankam la loĝkondiĉo estas vere simpla (ĉambroj de 1 ĝis 3 litoj kun necesejo sur la koridoro), sed la prezoj estas tre maltaltaj: por la kvar tagoj en kompleta pensio nur 128,00 €, plus 5,00 € por la uzo de littukoj. Eblas tamen trovi aliajn malmultekostajn solvojn en la ĉirkaŭaĵo: en ĉi tiu kazo petu samideaninon Norma Cescotti

(norma.cescotti@fastwebnet.it).

En la programo estas pribibliaj renkontiĝoj, momentoj por komuna preĝado kaj kantado (pere de "Adoru"), komuna kunestado por praktiki kaj vivi la mesaĝon de la Biblio, vizito de la loka Ekumena Centro, renkontiĝo kun la pastro en la loka rusortodoksa preĝejo kaj partopreno en mallonga ortodoksa Diservo, ekskurso al Garda Lago kaj renkontiĝo en evangelia preĝejo por evangelia diservo kun ilia pastoro.

Kompreneble, temas pri internacia kunveno, pro tio

la partoprenantoj devas iomete scipovi Esperanton; krome estas bone kunporti la Biblion en Esperanto kaj la libron "Adoru". Tiuj, kiuj ankoraŭ ne posedas ilin, povas indiki tion en la aliĝilo, por ke la organizantoj povu disponigi ilin.

Por aliĝi, nepre antaŭ la fino de Januaro, la italoj povas peti la aliĝilon al UECI-prezidanto aŭ elŝuti ĝin el nia retejo:

<http://www.ueci.it/aligxiloj/>.

La aliĝo validas nur post antaŭpago de 40,00 € al konto de Stefan Lepping:

BIC:

GENODEM1SOE

IBAN:

DE25414601166242548500

Nepre indikante la motivon:

"Bibliaj Tagoj 2012".



Bildo de la *Madonna della Lasta*

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2012

(sono rimaste identiche a quelle del 2011)

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	21,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	10,50 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	10,50 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	42,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	42,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	84,00 €
Solo abbonamento a Katolika Sento (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a Espero Katolika (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per ogni associato ordinario e 1,05 € per l'associato giovane o familiare, mentre la quota dei soci individuali va interamente all'UECI.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I* codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di Katolika Sento è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

ELEZIONI

Il prossimo anno si deve rinnovare il Comitato Centrale UECI.

A tale proposito il nostro statuto recita:

Per l'eleggibilità è richiesto che ogni candidato: abbia compiuto il 16° anno di età; sia iscritto all'U.E.C.I. da almeno due anni consecutivi, compreso quello in corso; sia presentato da un Presidente di Gruppo o da tre membri del Comitato Centrale uscente o da almeno dieci Associati aventi diritto di voto.

Chiunque ne abbia i requisiti e si voglia candidare è pregato di comunicarlo al segretario dell'UECI entro il 15 marzo 2012. Per la raccolta delle firme di sostegno alla presentazione della candidatura ci si può rivolgere al presidente dell'UECI.

Indirizzo del segretario UECI:

Marco Politi via Montemartini, 4 - 20139 Milano - markpol00@yahoo.it

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Responsabile giovanile: Paola AMBROSETTO, via Emo 9/C, 30173 Mestre (VE) – tel. 041.5341532

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039 464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento, vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati)

Dank'al Dio

Sinjinoro promenas sur la marbordo kun sia nepeto. Subite alvenas granda ondo, kiu prenas la infanon kaj trenas lin en la maron. Tuj la avino laŭtvoĉe preĝas al Dio:

- Sinjoro, se vi savos la etulon, mi faros ĉion, kion Vi volas. Mi pliboniĝos, mi iros ĉiutage al la preĝejo, mi disdonos mian monon por bonfarado. Bonvolu, savu lin!

Tiumomente la ondo reĵetas sur la strandon la knabon, kiu tuj ekstaras tute sana.

- Dank'al Dio! ... Sed, kie estas lia ĉapo!?

En la transmondo

La papo, baptista pastoro kaj rabeno mortas samtempe pro aviadila akcidento kaj atingas kune la Paradizon. Sed ili mortis tro frue, tial en paradizo ankoraŭ ne estas taŭgaj lokoj por ili. Do Sankta Petro telefonas al Lucifero, por peti lin, ĉu li povas gastigi la triopon kelktage, dum en paradizo oni pretigas taŭgajn lokojn. Lucifero, kiu estas bona di-

ablo, konsentas kaj aranĝas lokon por ili en la Infero. Post kelkaj horoj la diablo telefonas al sankta Petro:

- Pardonu, ĉu vi ne povas repreni la tri ulojn, kiun vi sendis al mi? La pastro blanke vestita ne faras alion ol pardoni ĉiujn, la baptista pastoro jam savis la duonon de la damnitaj kaj la rabeno jam sukcesis kolekti monon por aĉeti klimatizilon.

Eskapo

- Kiel forfuĝis tiu krimulo? Ĉu mi ne ordonis ŝlosi kaj gardi ĉiujn elirejojn?
- Jes, sed li eskapis el la enirejo.

Peto

- Pardonu, oni povas havi tarif-rabaton, kiam oni telefonas sen paroli?
- Kion vi volas diri!?
- Mi devas telefoni al mia edzino.

Il Comitato Centrale dell'UECI e la redazione di Katolika Sento augurano a tutti buon Natale e un felice Anno Nuovo.

La Centra Komitato de UECI kaj la redakcio de Katolika Sento bondeziras al ĉiuj bonan Kristnaskon kaj feliĉan Novan Jaron.